

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ joulukuu ♦ decembro ♦ 5/2014



Ĉu eblus promeni
al la insuletoj?

ESPERANTO
2014
Reilua viestintää
Rättvis Kommunikation

La 19-a IMEK en Budapeŝto – ĉu plena lingva fiasko? p. 4–5

- ♦ Aliĝo al UEA utilas! Aliĝo helpas!, p. 6
- ♦ Radionkuuntelun uusia tuulia Varsovasta, p. 7
- ♦ Vintraj Tagoj en Tampere 7.–8.3.2015, p. 10

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Cefredaktoro: *Robert Bogenschneider*
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ robog@gmx.de
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ maj-lis@maisanjapa.info
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 24 EUR/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ 044 2642 742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
Pankkitili/Bankkonto: FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 300
Kansi/Pärm/Kovrile: Ĉu eblus promeni al la insuletoj? Foto: *Robert Bogenschneider*

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi
Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi
Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:
Robert Bogenschneider, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ robog@gmx.de
Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ tiina.kosunen945@gmail.com
Arja Kuhanen, Saratie 2, 31300 Tammela. ✉ arja.kuhanen@netti.fi
Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:
Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 ✉ tapani.aarne@mbnet.fi
Börje Eriksson, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 ✉ esperarto@phnet.fi
Tuomas Latva-Pirilä, Ratakatu 6 as. 12, 96100 Rovaniemi. ☎ 0400 702 816 ✉ tuomas.latva-pirila@suomi24.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*
Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ eafkasisto@esperanto.fi
Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:
FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (UEA/EAF Päivi Saarinen)
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Oficejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.
☎ 044 2642 742 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo ✉ eaf@esperanto.fi

Internet: www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando ♦ Twitter: [@finnlando](https://twitter.com/finnlando) aŭ twitter.com/#!/finnlando

Nia heredaĵo estu monda

En *La Ondo de Esperanto* 1/2015 kaj la retejo *sezonoj.ru* Jerzy Antoni Walaszek, prezidanto de EDE-PL, sciigas:

La 20an de novembro 2014 la pollanda ministrino pri kulturo kaj nacia heredaĵo Małgorzata Omilanowska subskribis dokumenton, laŭ kiu Esperanto estas enmetita en la Polan liston de nemateria kultura heredaĵo. Ĉi tiu enlistigo okazis danke al la intensa kunlaboro de EDE-PL (Pola Asocio Eŭropo-Demokratio-Esperanto) kun pollandaj parlamentanoj, pollandaj Esperanto-organizaĵoj, pola instituto de nacia kultura heredaĵo kaj kun helpo de landaj kaj eksterlandaj sponsoroj. La sukcesa evento, iniciatita de la pollanda parlamentano Edmund Wittbrodt kaj de la estrarano de EDE-PL Kazimierz Krzyżak, permesas estonte proponi Esperanton por la reprezenta UN-listo de la nemateria kultura heredaĵo de la homaro.

Estas grava sukceso, ke Esperanto estas menciita en listo de kultura heredaĵo. Jam aperis pluraj, precipe laŭdaj, komentoj kaj en la reta LODE kaj en *Libera Folio*, kiu raporte citis La Ondon. Sed atentigas Barbara Despiney, la reprezentantino de UEA ĉe Unesko, ke temas pri nacia heredaĵo, ne monda. Ŝi petas kunlaboron de poloj ĉe la Unesko-komisiono pri Monda heredaĵo, ke ili estu ĉefproponanto por Esperanto, kaj subteni ŝin en la kolektado de apogo de aliaj landoj. Se tiel la pola enlistigo apogos nian sukceson al la monda Unesko-listo, la atingo de la poloj estos pozitiva. Pri tio ni scios pli kiam vi legos ĉi tion; la Unesko-komisiono kunsidos ĉirkaŭ la verka tempo de ĉi tiuj linioj. Sed – ne ofendiĝu, samideanoj – se publiko vaste estus informita, ke Esperanto estas nacia heredaĵo de unu lando, ĉu tio estus pozitiva bildo pri nia afe-



ro? Esperanto estas afero monda kaj komuna, kiel ĝin celis ĝia iniciatinto.

Sed kion vere pri la poleco de Esperanto kaj Zamenhof? Tradukante kaj redaktante la lernolibron de *Stano Marček* en la finnan version (*Esperanto mutkattomasti*), mia plej signifa modifo de la originalo estis forlaso de unu sola vorto: *pola okulkuracisto* Ludwik Zamenhof fariĝis *silmälääkäri LZ*. Kial?

Zamenhof difinis sian devenon en 1912 en letero al la loka kongresa komitato en Krakovo jene: *”... laŭ mia politika-religia konvinko mi estas nek polo, nek ruso, nek hebreo, sed mi estas partiano de 'homaranismo' (ne miksu kun 'kosmopolitismo'); laŭ mia deveno mi alkalkulas min al la gento hebrea.”* Tiel li rekonfirmis sin kiel internaciulon kaj, plej grave, malakceptis ligon al ia ajn nacionalismo – tiam en Eŭropo kreskanta kaj baldaŭ komenconta grandan militon.

Foje-refoje aperas, eĉ lastatempe, provoj aŭ proponoj atribui al Zamenhof tiun aŭ alian naciecon. Tio estas hontige al la atribuanto kaj al ni esperantistoj, se ni tion permesas. Li opiniis la etnan devenon afero ne inda je elstarigado, entute nur mencienda, se kunparolanto demandas pri ĝi. Li volis, se eble, aparteni al popolo kun nomo neŭtrale geografia, ne genta.

Ni esperantistoj estu ne nacioj kun nacioj, sed homoj kun homoj.

Tuomo Grundström

La 19-a IMEK en Budapeŝto – ĉu plena lingva fiasko?

Mi havis eblecon partopreni la 19-an internacian esperantan medicinan kongreson en Budapeŝto inter la 16-a kaj la 20-a de julio 2014. Estis antaŭinformita, ke krom Esperanto ankaŭ la hungara kaj la angla estos oficialaj lingvoj por varbi pliajn partoprenantojn. La organizantoj rakontis, ke el Pollando planis alveni eĉ 300 partoprenantoj, sed finfine alvenis nur 70, kio nature kaŭzis problemojn ekz. pro la rezervitaj hotelĉambroj k.t.p. Evidentiĝis, ke la polaj partoprenantoj escepte de ilia ĉefo, profesoro *Włodzimierz Opoka*, estis ne-esperantistoj. Tamen dank’ al tiu granda grupo la nombro de kongresanoj estis 183, devenantaj el ses landoj (Hungario, Pollando, Germanio, Ĉeĥio, Hindujo kaj Finnlando). Mi, la sola partoprenanto el Finnlando, ricevis en la flughaveno privatan akcepton kaj transporton al la kongresejo kaj la apuda hotelo.

La ĉefa temo de la kongreso estis ”Kronikaj malsanoj kiel minacoj de la nuntempaj socioj en la 21-a jarcento”. En la solena inaŭguro okazis prelego kunligita al la temo de la kongreso. La prelego estis aktuala, kun bonkvalitaj bildoj kaj majstre prezentita de profesoro *Károly Cseh*, sed bedaŭrinde nur per la angla. Por mi plej admirinde estis kvarlingva gvidado de la inaŭguro. Tion faris nome unusola persono, profesoro *György Nanovszky*, honora prezidento de Hungara Esperanto-Asocio. Li parolis krom hungare, ankaŭ esperante, pole kaj angle ege flue kvazaŭ per sia gepatra lingvo.

Dum la kongreso okazis entute 58 prelegoj, sed bedaŭrinde plejparte prezentitaj de poloj per la angla. Ili estis junaj sciencistoj kaj eblis vidi, ke ili bonege pretigis siajn prezentaĵojn kaj sukcesis esprimi sin per la angla. La temoj estis tute ne interesaj por mi, eĉ ne kompreneblaj dank’ al la angla lingvo. Ŝajnis, ke la junaj

sciencistoj venis al la kongreso por havigi spertojn pri praktika uzo de la angla dum prezentaĵo de siaj sciencaj esploroj por internacia publiko. Estis kelkaj prelegoj per la hungara kaj kelkaj prelegoj per Esperanto. Plej lerte kaj interese parolis germana juna neŭrologo *Christoph Klawe*. Lia temo estis multobla sklerozo (MS-malsano).

Abundis ekskursoj dum la kongresaj tagoj. Plej impone estis vespera rondveturo per la ŝipo Eŭropo sur la Danubo-rivero meze de Budapeŝto kun luksa vespermanĝo kaj esperanta ĉiĉeronado pri la vidindaĵoj de la lumigita, vespera Budapeŝto. Dum aliaj ekskursoj ni povis viziti la budapeŝtan sav-muzeon kaj sidejan domon de la hungara tutlanda sav-servo. Ni povis ankaŭ vidi interne la enorman, plene renovigitan parlamentan domon de Hungario. Malgraŭ la varmege ni promenadis ankaŭ en la urbo en vidindaj lokoj kun esperantaj gvidantoj. La anglalingvanoj havis sian propran grupon kun anglalingvaj gvidantoj.

Dum la kongreso mi povis sperti, kion signifas lingva kaoso kaj entrudigo de la angla eĉ en esperantaj rondojn. Mi provis ĉiam trovi nur esperantajn prelegojn, sed plejparte mi devis senreviĝi: Kvazaŭ por estimo al la anglalingvaj titoloj de prelegoj estis nur per la angla. Sed mirinde ekster la prelegejoj mi malofte aŭdis la anglan lingvon. En interparoloj estis uzata plejparte Esperanto kaj la pola. Mi konkludis, ke la angla lingvo ne konvenas por hejmeccaj konversacioj inter alilingvanoj. Hungaroj eĉ malkaŝis al mi, ke dum oficiala urba akcepto de la pola grupo en la angla lingvo, oni povis rimarki, ke la poloj ne komprenis multe pri tio, kion oni parolis al ili. Do, la angla ŝajnis ankaŭ ne funkcii en oficialaj, ne-fakaj paroloj. Sed mi spertis, kiel bele kaj lerte multaj hungaroj parolas Espe-

ranton kaj mi povis senti ilian elkoran simpatian kvazaŭ neniun diferencan estus inter finnoj kaj hungaroj!

Dum la adiaŭa vespero mi sidis ĉe tablo apud mia nova hungara amikino kaj ni observis la tablojn ĉirkaŭ kiuj sidis la poloj. Ni amuziĝis parolante pri ili. Speciale poloj estis bele vestitaj pro la posta balo kaj mi admiris nigre vesti-

tan polinon, kiu estis ege abunde ornamita per kristaloj brilantaj kiel diamantoj. Mi diris al la amikino: Rigardu, kiel brilas ŝiaj beligaĵoj! La amikino rigardis al mi pripensante, ridetante kaj respondis: Jes, – sed ne brilas ŝiaj lingvoscioj! Kaj ni ridegis...

Arja Kuhanen

Esperanto-societo en Turku

Jula tempo en Esperanto-societo en Turku

Nia tradicia jula festeto okazos ankaŭ ĉi-jare en la kunvenejo de NNKY en *Vähä Hämeenkatu 12* merkrede, la 17-an de decembro 2014 je la 17.30. En la programo estas la tradiciaj partoj kiel kristnaska evangelio, julaj kantoj kaj vizito de la julavo, sed ankaŭ ni memoros la pasintjarajn okazojn, ekzemple la UK-n en Argentino. Ankaŭ aferoj lige al Zamenhof-tago estos prioritaj. Bonvolu sciigi pri via alveno al sekretario de EST, *Leena Tiusanen* (leena.tiusanen@elisamet.fi, tel. 050-5757956). Bonvenon!

Kursoj en Civitana Instituto de Aurala rekomenciĝos 14.1.2015, same la merkredaj renkontiĝoj en la biblioteka kafejo. Jarkunveno okazos komence de februaro, la membroj ricevos alvokon. Kontaktuloj Leena Tiusanen kaj *Tiina Oittinen*.

Joulun aikaan Turussa

Turun Esperanto-yhdistyksen perinteinen pikkujoulujuhla järjestetään tänäkin vuonna tutussa paikassa: NNKY:n salissa, Vähä Hämeenkatu 12. Päivä on keskiviikko 17.12.2014 kello 17.30 alkaen. Ohjelmassa niin jouluisia perinteitä kuten jouluevankeliumi, joululaulut ja joulupukin vierailu kuin esperantoasioitakin: muistellemme viime kesän tapaamisia, kuten Buenos Airesin maailmankongressia, sekä Zamenhof-päivään liittyviä asiota.

Kurssit Auralan kansalaisopistossa jatkuvat 14.1.2015 ja tammikuussa tapaamme taas myös keskiviikkoihin kirjaston kahvilassa. Helmikuun alussa pidetään vuosikokous, johon jäsenet saavat kutsun tammikuussa.

Lisätietoja yhteyshenkilöiltä: Leena Tiusanen, leena.tiusanen@elisamet.fi, puh. 050-5757956 ja Tiina Oittinen, tiina.oittinen@pp.inet.fi tai puh. 050-5494709. Tervetuloa!

Malfermaj pordoj en la EAF-oficejo Avoimet ovet Esperantoliiton toimistossa

En la oficejo de EAF, adreso Siltasaarencatu 15 C 65, Helsinki, estos malfermaj pordoj dimanĉe la 14an de decembro je la 14–17. Bonvenon por babili kaj renkonti estraranojn! Ni regalos vin per la kutimaj julaj aĵoj: varma glögi-trinkaĵo kaj spickukoj.

Suomen Esperantoliiton toimistossa, osoitteessa Siltasaarencatu 15 C 65, Helsinki on avoimet ovet sunnuntaina 14. joulukuuta klo 14–17. Tervetuloa juttelemaan ja tapaamaan hallituksen jäseniä! Tarjolla glögiä ja pipareita.

Aliĝo al UEA utilas! Aliĝo helpas!

Kiam mi laboris en la Centra Oficejo de UEA en la okdekaj jaroj, ni havis inter sep mil kaj ok mil individuajn membrojn. Nun la membronombro ŝvebas ĉe la limo de kvin mil. Samtempe, tamen, Esperanto disfloras inter multaj junuloj tutmonde, kiuj danke al Interreto fariĝis aktivaj lernantoj kaj uzantoj de la lingvo; kaj ankaŭ mankas en niaj vicoj multaj “veteranoj” de la movado. Nia membrobarba kampanjo celas do rekreskigi nian “rondon familian”, kiu praktike kaj simbole konsistigas la kernon de la Esperanto-movado mondscale.

Kial do aliĝi al UEA? Ekzistas multaj bonaj argumentoj por tio. Helpu nin disvastigi ilin – dum landaj kongresoj, ĉe lokaj grupoj, en revuoj, en *Facebook*, *Lernu.net*, radioprogramoj kaj en Esperanto-televido. Kaptu ĉiun okazon por menci, ke vi mem estas membro de UEA. Per via helpo, nia monda asocio povos rekapti la fortojn bezonatajn por fronti la defiojn de la 21-a jarcento!

Per aliĝo al UEA, **oni kontribuas al la tutmonda kresko de Esperanto**. Ĉiujare per siaj diversaj fondaĵoj UEA donas konkretan subtenon al asocioj kaj aktivuloj en Azio, en Afriko, en Ameriko; per tiu agado, nia komunumo fariĝas kulture pli kaj pli riĉa, bunta, inkluziva.

Per aliĝo al UEA, **oni plifortigas la voĉon de la lingvo kaj movado**. Estas ĉefe la reprezentantoj de UEA kiuj argumentas por la valoro kaj aktualeco de Esperanto ĉe UN kaj Unesko kaj en diversaj internaciaj forumoj. Tiu agado ankaŭ helpas krei kondiĉojn por sukcesa informado sur lokaj kaj landaj niveloj.

Per aliĝo al UEA, **oni subtenas instruadon de Esperanto kaj trejnadon de aktivuloj**. In-

teralie, la AMO-seminarioj de UEA donas rimedojn kaj okazojn por vastigi la konojn kaj kapablojn de homoj sur ĉiuj niveloj de la movado.

Per aliĝo de UEA, **oni esprimas solidarecon kun la mond vasta Esperanto-komunumo**. Ĉiujare UEA subtenas kulturajn projektojn diverslande, venigas homojn al kongresoj kaj seminarioj, kaj membrigas junulojn el malriĉaj landoj por doni al ili senton de aparteno al la internacia komunumo. Ofte la dankmesaĝoj de tiaj junuloj al la CO estas ege kortuŝaj.

Kaj ni ne forgesu, ke **UEA-membreco ankaŭ donas personajn avantaĝojn**. Inter ili aparte menciindas forta rabato al Universalaj Kongresoj, 10%-a rabato en la Libro-servo, kaj abono al la Gvidlibro aŭ Jarlibro kaj la revuo Esperanto, papere kaj rete. Por aktiva esperantisto, tiuj estas nemalhaveblaj rimedoj por partopreni en la movado en tutmonda skalo.

Ne mankas argumentoj. Ni disvastigu ilin! Farante tion, tamen ne forgesu pagi vian propran kotizon – eĉ ankoraŭ por la jaro 2014! Kaj pagante por la jaro 2015, la jaro de la 100-a Universal Kongreso, memoru samtempe pri la ekzisto de aliaj kategorioj per kiuj oni speciale povas subteni UEA, kiel Societo Zamenhof, Dumviva Membreco aŭ Patronoj de TEJO. Per donacoj al Fondaĵo Canuto vi povas subteni homojn el malriĉaj aŭ nepagipovaj landoj.

Ek al rekordata kresko de nia membraro en 2015!

Mark Fettes

Radionkuuntelun uusia tuulia Varsovasta

Puolan radion esperantonkieliset lähetykset käynnistettiin 4.4.1959. Puolivuosisatainen perinne jatkuu. Tänäpä on äänessä Pola retradio en Esperanto. Edelleen kajahtavat eetteriin sanat Parolas Varsovio la naskiĝurbo de Esperanto. Kaikki on perusteellisesti muuttunut. Enää ei tarvitse murehtia kuuluvuuden vaihtelusta ja huojunnasta. Lähetykset ovat vaivatta ja selkeästi tavoitettavissa ja tarvittaessa toistettavissakin helposti. En liioittele, kun sanon nykyistä Puolan radion seurantaa kuuntelijan juhllaksi. Hakusanaksi kirjoitetaan Pola retradio en Esperanto. Näin päästään aloitussivulle ja seikkailu voi alkaa. Varsinaiset lähetyspäivät ovat tiistai ja perjantai, mutta ohjelmat säilyvät verkossa ja ovat milloin tahansa toistettavissa. Juuri tämä on uskomaton asia entisiin aikoihin verrattuna.

Meitä hemmotellaan monella muullakin tavalla. Kuuntelija saa myös halutessaan esimerkiksi uutistekstin näkyviin. Sehän selvästi helpottaa vasta-alkajan ja kokeneidenkin ohjelmanseurantaa. Sanon joskus juhllallisesti, että Puolan radio tarjoaa korkeakouluopetusta kielenkäytössä ja sanavaraston kartuttamisessa. Eri maista ole-

vien ihmisten haastattelut kertovat myös siitä, miten helposti ymmärrettävää esperantoa puhutaan kaikkialla maapallolla. Etsi Puolan radion sivustolta hakusana ”Antaŭ la mikrofono”, klikkaa sitä ja olet kielentaitajien seurassa. Toimittaja Barbara Pietrzak saa vieraat ilmaisemaan ajatuksensa sujuvasti. Toimituksessa työskentelee neljä viehättävää naisääntä Gabriela, Milada, Krystyna ja Barbara. Miehiä on puuhassa kaksi Maciej ja Tomasz – molemmat erinomaisia kielenkäyttäjiä.

Mikäli kuuntelet ohjelmia, anna silloin tällöin palautetta toimitukseen osoitteella *barbarinella@gmail.com*. Se rohkaisee ja antaa intoa ohjelmantekoon. Olen ollut kuulolla Varsovan aalloilla jo 55 vuotta. En ole vielä kyllästynyt. Pienikin elonmerkki kuuntelijoilta piristää toimittajan arkipäivää. Varsinaiset lähetyspäivät ovat siis tiistai ja perjantai. Jälkimmäisenä kuullaan kirje-laatikko. Ohje meille kaikille Varsovasta kuuluu näin: ”Aŭskultu nin kaj aŭskultigu aliajn!”

Jorma Ahomäki

Puolan radion kuuntelija vuodesta 1959

Esperanto-societo Antaŭen informas

Antaŭen havis siajn elekto- kaj estrarkunvenojn la 17-an de novembro. Estraranoj por la jaro 2015 estos jenaj:

- *Markus Sunela*, prezidanto
- *Sylvia Hämäläinen*, vicprezidanto
- *Tapani Aarne*, sekretario/kasisto
- *Veli Hämäläinen*, estrarano
- Vicestaranoj: *Terhi Laaksonen*, *Marjatta Ström* kaj *Pentti Järvinen*.
- Agadkontrolantoj: *Jukka Laaksonen* kaj vice *Anja Karkiainen*.

Eventoj en la jaroj 2014–2015 en la klubejo ”Nesto”:

- 15.12. je la 17.00: Zamenhof-vespero
- 12.01. je la 17.00: Januara vespero
- 14.01. je la 11.30: Esperanto-klubo
- 02.02. je la 17.00: Februara vespero
- 16.02. je la 17.00: Jarkunveno
- 02.03. je la 17.00: Marta vespero
- 13.04. ja la 17.00: Aprila vespero

Bv. vidi precize pri temoj de vesperoj ktp. ĉe la retejo de Antaŭen: www.esperanto.fi/tampere/Ohjelma

El la finna E-historio: Esperanta Finnlando, aprilo (n-ro 4/1921)

Esperanto en Finnlando dum 1920.
Laŭ la jarraporto prezentita al la kongreso en Tampere
(rim.: landa kongreso)

INSTRUADO

Dum la pasinta jaro estas al ni informitaj kursoj de Esperanto en ĉ 20 lokoj kun sume preskaŭ 2000 lernantoj. El la kursoj estas aparte notindaj sekvantaj: oficiala kurso en la Finna Liceo Helsingforsa, kun instruisto pagita de la ŝtato, por tiuj lernantoj, kiuj jam en la printempo komencis Esperantan kurson. Aliaj kursoj en superaj lernejoj, sen ŝtata pago, en Finna Normala Liceo kaj Sveda Liceo Helsingforsaj, en superaj lernejoj en *Forssa*, *Turku* kaj *Tampere*. Aliaj institutoj kun Esperanto kiel instrua fako estis: Instruista seminario en *Rauma*, Universitataj daŭrigaj kursoj por popollernejaj instruistoj, Komerca instituto de Tampere, laboristaj kaj civitanaj (vesperaj) institutoj de *Oulu*, *Kotka*, *Vaasa*, *Rauma*, *Kajaani* kaj *Kuopio*, popolaj altlernejoj de *Mäkkipää* kaj *Radansuu*, daŭrigaj kursoj de la popollernejoj en *Tiiliruukki* kaj *Halikko*.

ESPERANTO-INSTITUTO DE FINNLANDO

Unu el la plej gravaj laboroj de nia Asocio konsistis en la funkciado de la Instituto, kies ĉefa tasko estas edukado de kapablaj instruistoj de Esperanto. La Instituto donis en la pasinta jaro entute 10 kursojn kun sume 148 lernantoj. La nomaroj de la diplomitoj (9 superaj, 24 elementaj kaj 10 provizoraj diplomoj) aperis en Esperanta Finnlando. La laboro de la instituto ricevis ŝtatan subvencion de 5000 mk.

La programo de la Instituto estas plivastigita de la komenco de ĉi tiu jaro, kiel oni povas legi el raporto jam pli frue presita. Letera instruado estas ankaŭ planita, sed ankoraŭ ne efektivigita pro manko de kapitalo.

ESPERANTA FINNLANDO

Niaj legantoj konas la pozicion de nia organo en la enlanda movado. Ni volas tamen doni kelkajn interesajn informojn. La propagando por Finnlando per nia revuo sukcesis rimarkinde. Ni scias pri almenaŭ 70 diversaj notoj kaj artikoloj pri Finnlando, ĉerpitaj el nia revuo en naciajn gazetojn de pli ol 10 diversaj landoj. Aparte la reklamo por Finnlanda Foiro sukcesis kontentige. Bedaŭrinde la ekstera ministerio, spite niaj ripetitaj petoj, ne donis ian subvencion por ĉi tiu laboro, por kiu ni sekve ne povas plu oferi tiajn fortojn kiel antaŭe.

La organo mem estas la plej bona spegulo de la nuna stato de nia movado. La atingita nombro de 800 enlandaj kaj pli ol 400 eksterlandaj abonantoj certe estas konsiderinda rezultato kvankam oni vole-nevole demandas, kie restas granda parto de la lernintoj de Esperanto (el Esperanta Legolibro ja estas de post 1918 venditaj pli ol 7000 ekz.)....

...Bedaŭrinde la nombroj de abonantoj kaj anoncoj malpliigis dum ĉi tiu jaro, plejparte pro la reganta financa krizo.

Vilho Setälä

La UK en Nitra kun ŝtatestra protekto kaj speciala poŝtmarko

La preparlaboroj por la 101-a Universala Kongreso de Esperanto en la slovakia urbo *Nitra* komenciĝis kaj jam kondukis al du gravaj sukcesoj. La prezidanto de Slovacia Esperanta Federacio, s-ro *Stano Marček*, kun fiero informas, ke la prezidento de Slovakio, s-ro *Andrej Kiska*, akceptis la inviton de SKEF fariĝi la Alta Protektanto de la 101-a UK. S-ro *Kiska* estis elektita kiel ŝtatestro ĉi-jare kaj plenumas la 5-jaran oficon ekde la 15-a de junio.

Aperos ankaŭ porokaza poŝtmarko. La ĝenerala direktoro de la Slovaka Poŝto, inĝ. *Tomáš Drucker*, konfirmis tion en letero al *Stano Marček*, en kiu li skribis pri la intenco

eldoni du poŝtmarkojn en 2016, kiam Slovakio unuafoje funkcios kiel la prezida lando de Eŭropa Unio. Jam pli frue estis decidite, ke la unua marko estos dediĉita al "ŝtat-reprezentaj aferoj", sed la dua ankoraŭ ne havis specifan temon. "Tial ni bonvenigas vian iniciaton eldoni poŝtmarkon okaze de la Universala Kongreso de Esperanto, kiu same okazos ĉe ni la unuan fojon", skribis inĝ. *Drucker*, aldonante, ke "per komunaj fortoj ni sukcesos videbligi nian landon ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en la mondo".

[laŭ GK 558]

Karavano al Lillo BL5 – Karavaani BL5 Lilleen

Kiel informita en la antaŭa numero, la buskompanio *Launokorpi* estas denove la aranĝanto de nia buskaravano. La tempo kaj itinero de la karavano estas planita jene: Ekveturo 22.7. vespere el *Turku* per buso al la haveno de *Naantali*. De tie ni havos ŝipon al *Kapellskär* kaj poste daŭrigos per buso al *Malmö*. El *Malmö* denove ŝipe al *Travemünde*. Alveno al *Lille* okazos 24.7. malfrue. Reenveturo el *Lillo* 1.8. posttagmeze al *Travemünde*, de kie 3.8. nokte ŝipo al *Helsinki*, alveno tie 5.8. matene.

Ĝis nun aliĝis 15 partoprenantoj. Necesas 21 por realigi la busvojaĝon. Kiam tio certiĝas, ni rezervos la hotelajn ĉambrojn en *Lillo*. Ankaŭ eblas nur unudirekta vojaĝo. Se eĉ la ideo pri la karavano plaĉus al vi, bonvolu aliĝi al la sek-

retario de EAF. Ŝi volonte donas al vi pliajn informojn.

Tähän mennessä yhteiselle bussimatkalte on ilmoittautunut 15 henkilöä, mutta tarvitsemme vähintään 21, jotta matka toteutu. Kun tähän on saatu varmuus, varaamme myös hotellimajoituksen Lilleen. On mahdollista tulla mukaan vain toiseen suuntaan. Matkan kuvaus suomeksi on edellisessä lehdessä (4/2014). Jos matka vähänkin kiinnostaa sinua, ilmoittaudu Esperantoliiton sihteerille. Hän kertoo mielellään lisätietoja.

**Bonvenon al la karavano BL5
Tervetuloa BL5 bussikaravaanimatkalle!**

Tiina Oittinen, sekretario de EAF, liiton sihteeeri
tiina.oittinen@pp.inet.fi, tel. 050 549 4709.

Vintraj Tagoj – Talvipäivät

Tampere 7.–8.3.2015

Kunvenejo: Internacia funkcentro

Suvantokatu 13, 33100 Tampere

Kokouspaikka: *Tampereen kansainvälinen toimintakeskus,
Suvantokatu 13, 33100 Tampere*

Programo – Ohjelma (*ŝanĝoj eblas - muutokset mahdollisia*)

7.3. SABATO / LAUANTAI

09.00–11.00 Kunvenoj de membroasocioj de EAF laŭ alvokoj. *Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöjen kokouksia.*

11.00–12.30 Lunĉo (proprakoste). *Lounas (omatoimisesti).*

12.30–13.00 Akceptejo malferma en Internacia funkcentro. *Ilmoittautuminen toimintakeskuksessa.* Suvantokatu 13.

13.00–15.00 Malfermo de la tagoj. Publika prelego finnlingve. *Päivien avaus. Arto Mustajoen yleisöluento: Lingua francat yleisenä ilmiönä.* Loko *Paikka:* Nikolainsali, Tuomiokirkonkatu 27.

15.00–15.30 Kafo/teo. *Kahvi/tee.* Suvantokatu 13.

15.30–17.30 Jarkunveno de EAF (komence kontrolo de rajtigiloj). *Suomen Esperantoliiton vuosikokous (aluksi valtakirjojen tarkastus).*

17.30–18.00 Paŭzo. *Tauko.*

18.00–19.30 Vespermanĝeto. *Iltapala.*

19.30–21.00 Vespera, kongrestema programo (memoroj pri la 80-a UK antaŭ 20 jaroj, pri la pasinta 99-a, pri la venonta 100-a en Lillo kaj la planita sekva UK en Finnlando). Muzikas kvarteto *SoilaFE.* *Iltaohjelmaa Esperan-*

ton maailmankongressien hengessä: (Tampere 1995, Buenos Aires 2014, Lille 2015 ja mahdollinen tuleva Suomen kongressi). *Musisoi nelihenkinen SoilaFE.-yhtye.*

8.3. DIMANĈO / SUNNUNTAI

9.00–9.30 Vizito al ortodoksa preĝejo de Tampere (Tuomiokirkonkatu 27), gvidas Jukka Laaksonen. *Tutustuminen Tampereen ortodoksiseseen kirkkoon.*

11.00–12.00 Vizito en Tampere-domo. *Vierailu Tampere-taloon.*

12.00–12.30 Piedirado al muzea centro *Vapriikki*, adreso: Alaverstaanraitti 5. *Siirtyminen Museokeskus Vapriikkiin, Alaverstaanraitti 5.*

12.30–14.00 Muzea centro *Vapriikki*, vizito en diversaj ekspozicioj laŭ propra gusto. *Tutustuminen museokeskuksen näyttelyihin omien mieltymysten mukaisesti.*

14.00– Adiaŭa lunĉo en restoracio *Valssi* de la muzea centro proprakoste. *Päätöslounas Museoravintola Valssissa omakustanteisesti.*

Bonan hejmenvojaĝon! *Hyvää kotimatkaa!!*

Vintraj Tagoj 2015

La venontaj Vintraj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando okazos en Tampere, la 7-an kaj 8-an de marto 2015. Kiel dum kelkaj lastaj jaroj, la oficialaj kunvenoj okazos sabate kaj dimanĉe ni daŭrigos per pli neoficialaj programeroj.

La sabata kunvenejo estas la loka Internacia funkcentro, en la adreso Suvantokatu 13 (300 m for de la fervoja stacio). Temas pri la komuna "hejmo" de pli ol 20 diversaj amikecaj societoj. Surloke okazos denove librovendado de EAF kaj de la loka klubo Antaŭen. Posttagmeze okazos publika finnlingva prelego de prof. *Arto Mustajoki* pri lingva temo. Dum la jarkunveno de EAF ni ricevos trarigardon al la stato kaj proksima estonteco de la asocio. Post vespermanĝeto surloke ni daŭrigos per plimalpli kongrestema programo (memoroj pri la 80-a UK antaŭ 20 jaroj, pri la pasinta 99-a, pri la venonta 100-a en Lillo kaj la planita sekva UK en Finnlando). Intertempe muzikas la kvar-teto *SoilaFE*.

Dimanĉe ni kolektiĝos en Tampere-halo por refreŝigi kongresajn memorojn, rigardos la betulon plantitan okaze de la kongreso, kaj poste daŭrigos al la muzea centro *Vapriikki*. Tie oni povas laŭ propra gusto viziti diversajn ekspoziciojn (ekz. la finnajn poŝtomuzeon, ŝuomuzeon, glacihokean muzeon, Tampereon en 1918 kaj la baza urba ekspozicio). La eniro-pago estas inkluzivita en la aliĝkoto. La Tagoj finiĝos per komuna lunĉo proprakoste en restoracio *Valssi* de la muzea centro. Post la fermo oni ja rajtas memstare daŭrigi la muzean viziton.

Aliĝoj kaj kontaktopersonoj

Bv. aliĝu aŭ sendante per poŝto la apudan aliĝilon al EAF aŭ retpoŝte al la adreso *eafmendoj@esperanto.fi* kaj pagante la koncernajn pagojn al la konto de EAF. Memoru uzi **referencnumero** sen indiki temon de la pago. Bv. noti, ke ne sufiĉas nur sendi la pagon al la konto, ĉar ni bezonas krome scii kiujn programerojn vi



ALIĜILO



Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF 7.–8.3.2015 (Internacia funkcentro, Kansainvälinen toimintakeskus, Suvantokatu 13, Tampere)

Nomo: _____

Adreso: _____

Tel./Ret-adreso: _____

Aliĝkoto (inkluzivas programon ambaŭtage kaj kafon kaj vespermanĝon sabate):

42 EUR ĝis 20.2.2015 _____

50 EUR post 20.2.2015 _____

